

36 BALADO PRI JURAJ ĈUP

„Tio, sinjoroj, vere okazas,” diris poste ĝendarma kapitano Havelka, „nome tio, ke ĉe krimuloj iam aperas ia speciala skrupulemo kaj ordemo. Pri tio mi povus rakonti al vi diversajn historietojn, sed la plej stranga estas tiu pri Juraj Ĉup.

Ĝi okazis al mi, kiam mi estis ĉe ĝendarmoj en Subkarpata Jasina. Foje en vintra nokto ni drinkis ĉe judo; estis tie distriktestro, iu fervoja inspektoro kaj ia publikaktiva eminentularo; kaj memkomprene ciganoj. Aŭskultu, la ciganoj, mi ne scias, kia naciaĉo ili estas; sed mi opinias, ke ili estas Ĥamidoj. Kiam ili ludas en la orelon, ĉiam pli proksime, kaj ĉiam pli mallaŭte, ratoj aĉaj, kiam ili tiel sorĉas en la orelon, tiam... tiam... ili tiras rekte animon el via korpo: mi diras al vi, ilia muziko estas ia terura kaj sekreta malvirto. Kaj kiam ili tiel akroĉis sin al mi, mi ploraĉis, mi blekis kiel cervo, per bajoneto la tablon mi trapikis, glasetojn rompis, kantis kaj muron per kapo batis, volis iun mortigi aŭ iun ami - sinjoroj, tiajn aferojn faras homo, kiam lin ciganoj ensorĉis.

Kaj kiam mi estis en kulmina ekstazo, venis judo gastejestro kaj diras, ke ekstere antaŭ la gastejo atendas min ia ruteneto. Li atendu aŭ venu morgaŭ, mi kriis; ĉi tie mi priploras mian junecon kaj enterigas miajn revojn; mi amas iun sinjorinon, iun belan kaj grandan sinjorinon - ludu al mi, ci ŝtelisto cigana, ludeligu el mia animo la doloron, mallonge, tiajn parolojn mi havis; sciu, tio apartenas al tiu muziko; tiu doloro kaj ega trinkado.

Proksimume post unu horo denove venis la gastejestro, ke la ruteno tie ekstere en frosto ankoraŭ atendas. Sed ankoraŭ mi ne finploris mian junecon kaj ne dronigis en Asz-tokajo mian tristegon; nur mi mansvingis kiel Ĝingis-Ĥano, ke pri ĉio mi estas indiferenta, nur ludu, ciganoj; kaj kio plu estis, tion jam mi ne scias bone, sed kiam ĉe mateniĝo mi eliris antaŭ la drinkejon, estis tia frosto,

36 BALADA O JURAJI ĈUPOVI

„To se, páni, opravdu stává,” pravil na to četnický kapitán Havelka, „totiž to, že se u zločinců někdy vyskytne taková zvláštní svědomitost a řádnost. O tom bych vám mohl povídat všelijaké případy, ale nejdívnější je ten s Jurajem Ĉupem.

To se mně stalo, když jsem byl u žandarmů na Podkarpatsku v Jasině. Jednou v lednové noci jsme u žida mazali deku; to byl okresní náčelník, nějaký inspektor od dráhy a taková ta exponovaná honorace; a to se rozumí, cikáni. Poslouchejte, tihle cikáni, já nevím, co to je za pronárod; ale já myslím, že to je pokolení Chámovo. Když tak člověku hraji do ouška, pořád blíž a pořád tišeji, krysy mizerné, když mu tak čarují do ucha, tu... tu... tu vám zrovna vytahují duši z těla; já vám říkám, ta jejich hudba, to je nějaká strašná a tajemná neřest. A když se tak přísáli ke mně, já brečel, já řval jako jelen, bajonetem stůl jsem probodal, skleničky rozbíjel, zpíval a hlavou do zdi bil, chtěl někoho zabít nebo někoho milovat - páni, takové věci vyvádí člověk, když mu cikáni učarovali. A když jsem byl v nejlepším, přišel žid šenkýř a povídá, že na mě venku před hospodou čeká nějaký Rusňáček. Ať čeká nebo ať přijde zítra, křičel jsem; já tady oplakávám svou mladost a pochovávám své sny; já miluju jednu paní, jednu krásnou a velkou paní – hraj mně, ty zloději cikánská, vyhraj mně z duše tu bolest – zkrátka takové řeči jsem vedl; víte, to už patří k té muzice, ta bolest a to strašné pití.

Za nějakou hodinu zas přišel šenkýř, že ten Rusňák tam venku na mraze ještě čeká. Jenže já jsem pořád ještě neoplakal svou mladost a neutopil v Aszu tokaji ten svůj žal; jen jsem tak mávnul rukou jako Džingischán, že mně je všechno jedno, jen hrejte, cikáni; a co bylo dál, to už dobře nevím, ale když jsem k ránu vyšel před krčmu, byl takový mráz,

ke la neĝo grincis kaj sonoris kiel vitro kaj antaŭ la gastejaĉo staris tiu ruteno en blankaj lansandaloj, blanka pantalono kaj blanka ŝafpelto.

Ekvidinte min, li riverencis ĝis la talio kaj ion raŭkis. Kion ci volas, bácsi, mi diras al li; se ci detenos min, mi donos al ci vangofrapon. Grandpova sinjoro, diras la ruteneto, min sendas ĉi tien la vilaĝestro el Volova Lehota! Oni mortigis Marinan Matejová.

Iom mi resobriĝis; Volova Lehota, ĝi estis ia vilaĝeto aŭ pli vere solejo el dek tri kabanoj proksimume tridek kilometrojn malproksima en montoj; mallonge, en tia vintro bela donaĉo. Pro Kristsinjoro, mi ekkriis, kaj kiu mortigis ŝin? Mi mortigis, sinjoro grandpotenca, diris la ruteno humile. Juraj Ĉup oni nomas min, filo de Dimiter Ĉup. Kaj ci venas cin denunci? mi abruptis lin. La vilaĝestro ordonis, diris Juraj Ĉup rezigne. Juraj, li ordonis, anoncu al ĝendarmo, ke ci mortigis Marinan Matejová. Kaj kial ci mortigis ŝin? mi krias. Dio ordonis, diris Juraj, kvazaŭ ĝi estus memkomprenebla. Eternulo ordonis, mortigu Marinan Matejová, cian naskfratinon, de malbona spirito obsedita. Tondro al ci, mi diris, sed kiel ci venis ĉi tien el Volová Lehota? Kun Dia helpo, diras Juraj Ĉup pie. Eternulo min gardis, por ke mi ne pereu en la neĝo. Estu laŭdata lia nomo.

Aŭskultu, se vi scius, kio estas neĝo-ŝtormo en Karpatoj; se vi scius, kio ĝi estas, se kuŝas dumetra neĝtavolo; se vi vidus tiun etan kaj malfortan dian hometon Juraj Ĉup, kiel li atendas ses horojn en la terura frostoj antaŭ la drinkejo por denunci sin, ke li murdis nebonan servistinon dian Marinan Matejová, mi ne scias, kion vi farus; sed mi kruccsignis min kaj kruccsignis sin ankaŭ Juraj Ĉup, kaj poste mi arestis lin; poste mi lavis miajn vangojn per neĝo kaj alligis al mi skiojn kaj kun unu ĝendarmo, Kroupa li nomiĝis, ni pelis nin supren al Volova Lehota. Kaj se min haltigus ĝendarma generalo mem kaj dirus: Havelka, ci idioto, nenien veturu, en tia neĝo la vivo ja estas riskata, mi salutus kaj dirus:

že sníh skřípal a zvonil jako sklo, a před putykou stál ten Rusňák v bílých láptích, bílých gatích a bílém ovčím kožuchu.

Když mě viděl, poklonil se až po pás a něco chraptěl. Co chceš, báči, povídám mu; budeš-li mě zdržovat, dám ti po hubě. Velkomožný pane, povídá Rusňáček, mě sem posílá starosta zVolové Lehoty. Marynu Matejovu zabili.

Trochu jsem vystřízlivěl; Volova Lehota, to bylo takové selo nebo spíš samota třinácti chalup nějakých třicet kilometrů dál v horách; zkrátka v té zimě pěkné nadělení. Prokristapána, křikl jsem, a kdo ji zabil? Já zabil, pane velkomožný, řekl Rusňák pokorně. Juraj Ĉup mně říkají, Dimitra Ĉupa syn. A ty se jdeš udat? spustil jsem na něho. Starosta nařídil, pravil Juraj Ĉup odevzdaně. Juraji, kázal, ohlas žandárovi, že jsi zabil Marynu Matejovu. A proč jsi ji zabil? křičím. Bůh kázal, řekl Juraj, jako by se to rozumělo samo sebou. Hospodin nařídil, zab Marynu Matejovu, svou rodnou sestru, zlým duchem posedlou. Hrom do tebe, řekl jsem, ale jak jsi se sem z té Volovy Lehoty dostal? S pomocí boží, povídá Juraj Ĉup pobožně. Hospodin mě chránil, abych nezahynul ve sněhu. Buď jeho jméno pochváleno.

Poslouchejte, kdybyste znali, co je to sněhová bouře v Karpatech; kdybyste věděli, co to je, když leží na dva metry sněhu; kdybyste viděli toho drobného a slabého božího človíčka Juraje Ĉupa, jak šest hodin čeká v tom strašném mrazu před krčmou, aby se udal, že zavraždil nehodnou služebnici boží Marynu Matejovu, já nevím, co byste udělali; ale já jsem se pokřížoval, a pokřížoval se i Juraj Ĉup, a pak jsem ho zatknul; pak jsem si umyl tvář sněhem a připnul si lyže a s jedním četníkem, Kroupa se jmenoval, jsme si to hnali nahoru doVolovy Lehoty. A kdyby mě byl zastavil sám četnický generál a řekl: Havelko, ty troubo, nikam nepojedeš, vždyť v tomhle sněhu jde o život, byl bych mu zasalutoval a řekl:

Obee mi raportas, sinjoro generalo, Eternulo ordonis. Kaj mi veturus: Kaj ankaŭ Kroupa veturus, ĉar li estas Žižkovano; kaj ankoraŭ mi ne vidis Žižkovanon, kiu pro la vanto ne volus ĉeesti, se temas pri ia bravuro aŭ stultaĵo. Ni veturis do.

Mi ne priskribos al vi la vojon; nur mi diros al vi, ke fine Kroupa plorsingultis pro timo kaj laco kiel malgranda infano kaj dudekfoje ni diris al ni, ke venis nia fino kaj ke sur tiu loko ni restos; kaj la tridek kilometrojn ni veturis dek unu horojn, de nokto al nokto; tion nur, por ke vi sciu, kia ĝi estis. Sinjoroj, tia ĝendarmo havas ĉevalan karakteron; sed se li jam falas en neĝon kaj ploras, ke li ne plu kapablas iri, certe ĝi estas tia, ke ne eblas tion priskribi. Sed mi iris kvazaŭ ensonĝe kaj nur diradis al mi, ĉi tiun vojon faris Juraj Čup, hometo kiel tranĉileto, kaj ankoraŭ ses horojn atendis en frosto, ĉar la vilaĝestro ordonis tion al li; Juraj Čup en malsekaj lansandaloj, Juraj Čup en neĝoŝtormo, Juraj Čup kun dia helpo.

Aŭdu, se vi vidus, ke ŝtono falas supren anstataŭ malsupren, vi nomus tion miraklo; sed neniun nomos miraklo la migradon de Juraj Čup, kiu iris sin denunci; kaj tamen ĝi estis pli granda fenomeno kaj pli terura forto ol ŝtono falanta supren. Atendu, lasu min paroli; mi diras, se iu volas vidi miraklojn, devas rigardi homojn kaj ne ŝtonojn.

Alveturinte en Volova Lehota, ni ŝanceliris kiel ombroj, pli mortaj ol vivaj. Ni brufrapas ĉe la vilaĝestro, ĉio dormas; poste eliris la vilaĝestro kun fusilo, tia grandega barbulo, kaj ekvidinte nin, li ekgenuis kaj malligis niajn skiojn, sed eĉ ne vorton diris.

Rememorante tion, kvazaŭ mi vidus iajn strangajn bildojn solene simpligitajn; kiel la vilaĝestro kondukis nin senvorte en iun el la kabanoj; en la ĉambro lumis du kandeloj, antaŭ ikono genuis nigra virino, sur lito en blanka ĉemizo kadavro de Marina Matejová, gorĝo distranĉita ĝis vertebro; ĝi estis terura kaj tamen ia strange neta tranĉvundo, same kiel viandisto duonigas porkidon;

Poslušně hlásím, pane generále, Hospodin nařídil. A jel bych. A Kroupa by jel taky, protože byl Žižkovák; a já jsem ještě neviděl Žižkováka, který by pro fór nechtěl být při tom, když jde o nějakou tu bravuru nebo volovinu. Tož jsme jeli.

Já vám tu naši cestu nebudu líčit; jenom vám povím, že nakonec Kroupa vzlykal strachem a únavou jako malé dítě a že jsme si dvacetkrát řekli, že je s námi amen a že na tom fleku zůstaneme; a že jsme těch třicet kilometrů jeli jedenáct hodin, od noci do noci; to jen tak, abyste věděli, co to bylo. Páni, takový četník má koňskou náturu; ale když už padne do sněhu a brečí, že nemůže dál, tak to už musí být, že se to vylíčit nedá. Ale já jsem šel jako ve snách a jenom jsem si říkal, tuhle cestu udělal Juraj Čup, človíček jako kudla, a ještě šest hodin čekal na mraze, protože mu to starosta nařídil; Juraj Čup v mokrých láptích, Juraj Čup v bouři sněhové, Juraj Čup s pomocí boží.

Poslouchejte, kdybyste viděli, že kámen padá nahoru místo dolů, řekli byste tomu zázrak; ale nikdo nepojmenuje zázrakem to putování Juraje Čupa, který se šel udat; a přece to byl větší úkaz a strašnější síla nežli kámen, který padá nahoru. Počkejte, nechte mě mluvit; já říkám, chce-li kdo vidět zázraky, musí se koukat po lidech, a ne po kamenech.

Teda když jsme dojeli do Volovy Lehoty, motali jsme se jako stíny, víc mrtví než živí. Boucháme u starosty, všechno spí; pak vylezl starosta s puškou, takový bradatý obr, a když nás viděl, klekl a odepnul nám lyže, ale nepromluvil ani slovo.

Když tak na to vzpomínám, je to, jako bych viděl jakési divné obrazy slavnostně zjednodušené: jak nás ten starosta beze slova vedl do jedné z chalup; v sednici hořely dvě svíce, před ikonou klečela černá ženská, na posteli v bílé košili mrtvola Maryny Matejové, krk rozříznut až po obratle; byla to strašlivá a přitom tak podivně čistá rána, jako když řezník rozpoltí sele;

kaj la vizaĝo estis tiel nehome blanka, kiel blankaj estas nur tiuj, kiuj elsangis ĝis la lasta gutu. Poste denove same senvorte enkondukis nin la vilaĝestro al si; sed tiam en lia ĉambro jam atendis dek unu viroj en peltoj - mi ne scias, ĉu vi scias, kiel fetoras ŝafpeltoj: iel adstringe kaj malnovtestamente.

La vilaĝestro sidigis nin al la tablo, tuskraĉis, riverencis kaj diris: En nomo de Dio ni anoncas al vi morton de dia servistino Maria Matejová. Eternulo havu kompaton por ŝi! Amen, diris dek unu kampuloj kaj krucsignis sin. Kaj la vilaĝestro komencis: Antaŭ du tagoj nokte li aŭdis iun grati, mallaŭte skrapi de ekstere la pordon. Li opiniis, ke vulpo: li prenis fusilon kaj iris malfermi. Sur sojlo kuŝas virino. Li levis ŝin kaj tiam ŝia kapo falis dorsen. Ŝi estis Marina Matejová kun la tratanĉita gorĝo. Ĉar ŝi havis trahakitan laringon, ŝi estis muta. La vilaĝestro alportis Marinan en la ĉambrojn kaj metis ŝin sur la liton; poste li ordonis al paŝtisto, ke li trumpetu kaj kunvoku ĉiujn kampulojn el Volova Lehota al li.

Kiam ili estis kunvenintaj, li turnis sin al Marina kaj diris: Marina Matejová, antaŭ ol vi mortos, donu ateston, kiu vin mortigis. Marina Matejová, ĉu mi mortigis vin? Marina ne povis kapnei; sed ŝi fermis nur la okulojn. Marina, ĉu estis ĉi tiu, via najbaro Vlaho, filo de Vasilev? Marina fermis siajn plendajn okulojn. Marina Matejová, ĉu estis la ĉeestanta kampulo Kohut, nomata Vanka? Ĉu estis li ĉi tiu, kiu estas Martin Dudaš, via najbaro? Marina, ĉu estis li ĉi tiu, Baran, nomata Šandor? Marina, ĉu estis li, staranta ĉi tie, Andrej Vorobec? - Marina Matejová, ĉu estis li, Klinko Bezuchý, kiu staras antaŭ vi? Marina, ĉu estis li ĉi viro, Štefano Bobot? Marina, ĉu estis tiu, kiu vin mortigis, Tatka, montarano, filo de Mihal Tatka? Marina -

Tiumomente malfermiĝis la pordo kaj eniris Juraj Čup, frato de Marina Matejová. Marina ekstremis kaj malfermegis la okulojn. Marina, daŭrigis la vilaĝestro, kiu vin mortigis? Ĉu estis li, Fodor, nomata Terentík? Sed Marina plu ne respondis.

a ta tvář byla tak nelidsky bílá, jako jsou bílí jen ti, kdo vykvráceli do poslední kapky. Pak zase tak beze slova nás uvedl starosta k sobě; ale to už v jeho izbě čekalo jedenáct chlapů v kožuchách – já nevím, znáte-li, jak smrdí tyhle ovčí kožichy: tak nějak svěřavě a starozákonně.

Starosta nás posadil za stůl, odchrchlal, poklonil se a řekl: Ve jménu božím žalujeme vám smrt služebnice boží Maryny Matejové. Buď jí Hospodin milostiv! Amen, řeklo jedenáct gazdů a pokřižovalo se. A starosta začal: Před dvěma dny v noci slyší někoho škrabat, tichounce škrabat zvenčí na dveře. Myslel, že je to liška; i vzal pušku a šel otevřít. Na prahu leží žena. Zvedl ji, a tu jí padla hlava nazad. Byla to Maryna Matejová s hrdlem proříznutým. Protože měla přetátý hrtan, byla němá. Starosta donesl Marynu do izby a položil ji na postel; pak kázal pastýři, aby troubil a svolal všechny gazdy z Volové Lehoty k němu.

Když byli pohromadě, obrátil se k Maryně a řekl: Maryno Matejová, nežli zemřeš, podej svědectví, kdo tě zabil. Maryno Matejová, zabil jsem tě já? Maryna nemohla zavrtět hlavou; ale jen zavřela oči. Maryno, byl to tento zde, tvůj soused Vlaho, syn Vasylův? Maryna zavřela své žalující oči. Maryno Matejová, byl to tento přítomný gazda Kohut, řečený Vaňka? Byl to tento zde, který je Martin Dudaš, tvůj soused? Maryno, byl to ten zde, Baran, zvaný Šandor? Maryno, byl to ten, který tady stojí, Andrej Vorobec? Maryno Matejová, byl to Klimko Bezuchý, který stojí před tebou? Maryno, byl to tento muž, Štěpán Bobot? Maryno, byl ten, který tě zabil, Tatka, horár, syn Myhala Tatky? Maryno -

V tu chvíli se otevřely dveře a vešel Juraj Čup, bratr Maryny Matejové. Maryna se zachvěla a vytřeštila oči. Maryno, pokračoval starosta, kdo tě zabil? Byl to tento zde, Fodor, jménem Terentík? Ale Maryna už neodpovídala.

Preĝu, diris Juraj Ĉup, kaj ĉiuj kampuloj falis genuen. Fine la vilaĝestro leviĝis kaj diris: Enlasu ĉi tien la virinojn!

Ankoraŭ ne, diris la maljuna Dudaŝ. La mortinta servistino de Dio, Marina Matejová, en nomo de Dio, donu signon: ĉu mortigis vin Djuro, paŝtisto? Regis silento. Marina Matejová, animo antaŭ Eternulo, ĉu mortigis vin Toth Ivan, filo de Ivan? Neniu spiretis. Marina Matejová, en nomo de Dio, mortigis vin do via nask-frato, Juraj Ĉup? Mi mortigis, diris Juraj Ĉup. Eternulo ordonis, mortigu Marinan, obseditan de malbona spirito.

Premfermu ŝiajn okulojn, ordonis la vilaĝestro. Juraj, nun vi iros al Jasina kaj starigos vin antaŭ ĝendarmojn. Mi mortigis, vi diros, Marinan Matejová. Ĝis tiu tempo vi nek sidiĝos nek ion manĝos. Iru, Juraj!

Poste li malfermis pordon kaj enlasis la virinojn en la ĉambron, por ke ili ploru super la mortintino. Aŭdu, mi ne scias, ĉu ĝi estis pro la ŝafpeltoj aŭ ĉu en tio, kion mi vidis kaj aŭdis, estis tia stranga belo aŭ digno; sed mi devis iri eksteren, en froston, ĉar mi havis kapturon; je mia animo, en mi io leviĝis, kvazaŭ mi devus stariĝi kaj diri: Homoj de Dio, diaj homoj! Ni juĝos Juraj'on Ĉup laŭ la laika leĝo; sed en vi estas leĝo de Dio. Kaj mi estus riverencinta al ili ĝistalie; sed tio ne decas al ĝendarmo, kaj tial mi eksteriĝis kaj tiel longe sakris por mi mem, ĝis mi retrovis mian ĝendarman animon.

Sciu, la ĝendarmado estas kruda metio. Matene mi serĉtrovis en kabano de Juraj Ĉup dolarajn bankbiletojn, kiujn la mortintino Marina ricevadis de sia edzo el Ameriko. Memkomprene, mi devis tion raporti kaj juristoj faris el tio rabmurdon. Juraj Ĉup estis kondamnita al pendumo; sed neniu kredigos min, ke la vojon li faris per homa forto. Bone mi scias, kio estas la homa forto. Kaj mi opinias, ke ankaŭ iomete mi scias, kio estas di-juĝo."

Modlete se, ŝekl Juraj Ĉup a vŝichni gazdové padli na kolena. Koneĉně starosta vstal a ŝekl: Pusťte sem ženy!

Ještě ne, ŝekl starý Dudáš. Zesnulá služebnice boží, Maryno Matejová, ve jménu božím dej znamení: zabil tě Ďuro, pastýř? Bylo ticho. Maryno Matejová, duše před Hospodinem, zabil tě Tóth Ivan, Ivanův syn? Nikdo ani nedýchal. Maryno Matejová, ve jménu božím, tedy tě zabil tvůj rodný bratr, Juraj Ĉup? Zabil jsem, ŝekl Juraj Ĉup. Hospodin kázal, zab Marynu, zlým duchem posedlou.

Zatlačte jí oči, přikázal starosta. Juraji, teď půjdeš do Jasiny a postavíš se četníkům. Zabil jsem, ŝekneš, Marynu Matejovu. Do té doby neusedneš a ničeho nepojíš. Jdi, Juraji!

Načež otevřel dveře a pustil do izby ženy, aby hořekovaly nad mrtvou. Poslyšte, já nevím, bylo-li to z těch ovčích kožichů nebo z únavy nebo proto, že v tom, co jsem viděl a slyšel, byla taková divná krása nebo důstojnost: ale musel jsem jít ven, do mrazu, protože se mně točila hlava; namouduši, ve mně něco stoupalo, jako bych měl povstat a říci: Boží lidé, boží lidé! My budeme soudit Juraje Ĉupa po světském řádu; ale ve vás je zákon boží. A byl bych se jim poklonil po pás; ale to se na četníka nesluší, a proto jsem šel ven a tak dlouho jsem sám pro sebe sakroval, až jsem zase našel svou četnickou duši.

Víte, tohle četnictví je hrubé řemeslo. Ráno jsem vyšťáral v chalupě Juraje Ĉupa dolarové bankovky, které nebožka Maryna dostávala od svého muže z Ameriky. To se rozumí, musel jsem to hlásit, a tihle právníci z toho udělali loupežnou vraždu. Juraj Ĉup dostal provaz; ale nikdo mně nenamluví, že tu cestu ušel lidskou silou. Já vím dobře, co je lidská síla. A myslím, že i tak drobet vím, co je boží soud."